

Tamen, Esperanto havis kaj havas konsiderindan apogon ankaŭ de popoloj kies lingvojn Zamenhof ne atentis. Tolstoj, ekzemple, instigadis ĉiujn lerni Esperanton kaj ekzistas fervoraj adeptoj de ĉi tiu »Lingvo Internacia« en Japanio, Hindujo, Mezoriento kaj Latinameriko, ne menciante multnombrajn Esperanto-societojn, ligojn kaj asociojn en Eŭropo kaj Nordameriko. Oni instruis Esperanton en Unuiĝintaj Nacioj kaj oni elsendas en ĝi trans Voĉo de Ameriko. Ĝia vortaro havas siajn 80.000 vortojn kaj ĝia literaturo, originala kaj tradukita, enhavas pli ol 50.000 volumojn. Tio estas impona sukceso; ĝi estas ja ankoraŭ pli impona se oni kalkulas la fakton ke, aldone al ĉi tiu abundo de skribaj dokumentoj, Esperanto plejsukcese servis kiel parolata lingvo ĉe internaciaj kunvenegoj, depost 1905 kiam la unua Kongreso okazis en Boulogne-sur-Mer.

La historio de la Esperanto-movado forigas la argumentojn de tiuj kiuj asertas ke neniu artefarita lingvo iam ajn povos fariĝi anskrita **lingua franca**.....

La lasta punkto (temas pri la aserto »la tempo ne estis matura por internacia lingvo — Rim. de B.P.), la plej grava de ĉiuj, postulas iom da pritrakto. Estas memkomprenebla ke la mondo ne bezonis universalan lingvon en la tempo kiam plej multaj popoloj vivis en izoleco, kiam trafiko estis malriĉa kaj kontaktoj malfacilaj..... Per alveno de radio, televido, raketa tekniko, atomenergio kaj kontaktsatelitoj, teĥnologia unuiĝado de la terĝlobo estas finita kaj la bezono por internacia lingvo aperis kiel imperativo. Antaŭ kvindek jaroj universala lingvo estus plene uzebla rimedo por nemultaj, hodiaŭ ĝi estus riĉaĵo por multaj, morgaŭ ĝi koncernos ĉiujn.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)

413.164:91

NA GEOGRAFIA TERMINARO

(A. Albault, Toulouse, Francio)*

Nia gazetaro jam publicis kutimajn recenzetojn pri tiu multkolora mondmapo ellaborita laŭ skalo 1/42 000 000 sur folio 70 x 100 cm. kaj reproduktita de la institucio »Geokarta« (Beograd, 1968); ĝin eldonis la Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto. Bele prezentita ĝi indas ornami la murojn de niaj oficejoj kaj bibliotekoj.

Sed multe pli ol simpla mapo, tiu laboro estas por ni, antaŭ ĉio, baza geografia terminaro: kiel tia ĝi ankaŭ meritas recenzon; recenzon des pli severan, ke de la taŭgeco de tiu unua provo povas dependi nia tuta estonta geografia terminaro! Tion ni intencas fari en la sekvantaj linioj, tiel ke ŝtopiĝu tro evidenta breĉo en nia recenza literaturo.

*

* * *

Nu! Tiu baza terminaro konsistas el 850 nomoj de fizika kaj politika geografioj. Ĝi estis redaktita de Lic. Tibor Sekelj laŭ la decidoj de la »Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj nomoj«. Tiuj decidoj estas la frukto de 8-jara laboro de la nomita Komisiono.

*) 32 Av. Etienne Billières, Toulouse

Ni diru kelkajn vortojn pri tiu Komisiono, kies motoro ekde la komenco estas la Prezidanto-Fondinto de la Internacia Geografia Asocio. Jam en la 1958. li provis fondi komitaton konsistantan el 5 membroj de I.G.A. kaj 5 membroj de la Akademio, kaj kies tasko estus ordigi la Esperantajn geografiajn nomojn, se eble, ellabori tian sistemon kaj pli poste submeti siajn decidojn al aprobo de la Akademio. Definitive starigita en la Universala Kongreso de Varsovio en la 1959. sub la ĝisnuna nomo, la Komisiono tuj komencis intense labori sub la duobla prezidado de Tibor Sekelj kaj de la Prezidanto de la Akademio: unue ing. I.R.G. Isbrucker kaj ekde la fino de la 1963. Prof. G. Waringhien. Ceteraj membroj estis en la komenco sep Akademianoj; M.C. Bultier, F.A. Faulhaber, Prof. N. Kawasaki, Prof. I. Krestanov, J. R. Scherer, mag. V. Setälä, doc. Stöp-Bowitz kaj kvar kompetentaj membroj de I.G.A.: D-ro E.J. Görlich, D-ro J. M. Mablesone, M. Salzmänn kaj A.W. Thomson. En ok jaroj la komisiono ja evoluis: kelkaj membroj bedaŭrinde forpasis, aliaj retiriĝis pro diversaj motivoj; feliĉe la Komisiono sukcesis alligi al si Prof. Armand, eminenta soveta geografo.

Fine de la 1967. la Komisiono decidis prezenti la rezulton de sia laboro, kiu aperas do kiel la kolektiva propono de siaj lastaj membroj: Mablesone, Armand, Butler, Faulhaber, Stöp-Bowitz kaj Thomson sub la prezidado de Waringhien kaj Sekelj. Estas notinde, ke la Akademio eksciis pri la rezulto de tiu laboro nur samtempe kiel la vasta publiko. Cetere alia labormaniero estus apenaŭ ebla. Sed kompanse oni rimarkigu, ke la pretendoj de la Komisiono estas tute modestaj: ĝi nur alvokas la publikon **praktike uzi** la proponitan nomaron kaj poste, post 3-4-jara uzado, voki la atenton de la Komisiono »al tiuj nomoj, kiuj estas praktike neuzeblaj, kaj tial nepre korektendaj«.

*

* *

Tio ŝajnas al mi tute saĝa postulo principe, tamen mi ne povas malhelpi min pensi jenon: ni supozu, ke la Komisiono elektis ekzemple la volapukan **Meropo** anstataŭ la konatan **Ameriko**, kaj ni supozu ke la Esperantistoj obeeme uzos tiun nomon dum 3—4 jaroj, kiel oni efektive petas ilin; nu! kio okazos post tiuj 3—4 jaroj? Ĉu ili ne estos alkutimiĝintaj al tiu Volapukaĵo; ĉu ĝi tiam ne estos al ili tute oportuna: kial do ĝi ne estus? Sed ĝi estus nur al ili, spite al la internacieco al la propra korekta tradicio!! Kaj mi demandas, ĉu en tia hipotezo la »8 milionoj« da Esperantistoj esperus trudi la vorton **Meropo** al la 3—miliarda Homaro kiu unuanime diras **Ameriko**? Tial antaŭ ol

sekvi la Komisionon, mi opinias bona unue kritiki ĝian laboron kun plej granda severeco kaj eventuale prezenti rezervojn aŭ limigojn al tiu sekvado. La alvoko al praktika uzado ŝajnas al mi tute saĝa; ĝia sekvado ne estu blinda.

Ni do unue konsideru la principojn, laŭ kiuj la komisiono laboris, kaj poste ni esploru, ĉu tiuj principoj mem estis la plej taŭgaj, sublume da la atingitaj rezultoj.

Laŭ la deklaro, aperinta sur la mapo mem, la Komisiono klopodis sekvi kvin principojn kaj krome ĝi »ofte devis serĉi kompromison inter la Zamenhofaj principoj« (sed tiuj ne estas nomitaj), »la enradikiĝinta Esperanta uzo« (sed pli ol unu fojon ĝi estas ignorata, unu fojon ĝi eĉ estas piedpremata: Nigerio transprenas novan signifon), »la internacia rekoneblo« (sed enestas pli ol unu »Meropo«), kaj la »deziro de la lokaj esperantistoj«.

*

* *

La unua principo (aŭ pli ĝuste »klopodo«) estas »ke ĉiu nomo estu skribita per literoj el la Esperanta alfabeto«. Tute prave, se temas pri Esperanta do asimilita terminaro: ĉu necesis vortigi tian evidentajn? Eble ĝi ne evidentis por ĉiuj!

Dua klopodo: »ili estu esperantigitaj, kaj ne laŭeble plej korekte 'transskribitaj' el iu nacia lingvo«. Ankaŭ tio ŝajnas evidenta, sed jam tie penetras multe da subjektiveco: kion oni nomu »esperantigo, sed ne nur korekta transskribo«? Kio estas la limo inter ambaŭ nocioj? Ĉu ekzistas reguloj de transskribo, kaj ankaŭ reguloj de esperantigo?

Envere mi demandas min ĉu ne ĝuste tiu »klopodo« kulpigis pri kelkaj troaĵoj! Ekzemple, ĉu vere necesis la preskaŭ tuta forigo de la dividostreketo, kiu tamen restas en **Alma-ato**, **Sidi-ifnio**... Sed **Rio-Munio** iĝis Riomunio; **Rio-de-Oro** kaj **Dar-es-Salamo** perdas ne nur la internacian fizionomion sed eĉ la prononcon per transvestigo al Riodoro, Daresalamo. Eĉ la rusa skribas **Rio-de-ĵaneĵro**, verŝajne kiel la plimulto de la lingvoj kaj kiel estis ĝis nun la kutimo en Esperanto, sed ĉu ekde nun ni devos skribi Riodeĵaneĵro!

Estis prave kreita la kvazaŭprefikso **San-** por reprezenti ĉiujn Saint—, Sancto—, San—... de la diversaj lingvoj; en tiu funkcio ĝi estas pli taŭga, malpli peza ol nia Sankt—; sed mi forte dubas, ĉu la proponitaj ortografioj Sanfrancisko, Sandomingo... estas pli bonaj ol la vaste internaciaj kaj ĝisnunaj **San-Francisko**, **San-Domingo**, **San-Paŭlo** kaj multaj aliaj.

Tiel same la Komisiono preferas formojn kiel Novzelando, Novjorko, Novdelio. Per tio ĝi pekas kontraŭ la ĝisnuna uzado hezitanta inter **Nova Zelando** kaj **Nov-Zelando** unuflanke, kaj aliflanke kontraŭ la lastaj Akademiaj rekomendoj pri vortfarado: tiuj rekomendoj implicite rekomendas **Nova Zelando** (kaj ebligas **Nov-Zelandanoj**) sed kondamnas Novzelando. Aŭ necesus krei kvazaŭprefikson **Nov-** similan al **San-**; sed tiam leviĝas la demando pri eventuala preferindeco de **Neo-**: **Neo-Zelando**, **Neo-Zelandano**.

Fortlamio (termino 72) estas monstra esperantigo; fonetike necesus Forlamio, sed pli taŭgus traduko: **Fuorto-Lamio**. **Simile** ni povus havi **Puerto-Princo**, **Puerto-Novo**; aŭ ni eble preferus la solven de Waringhien: **Porto-Princo**, **Porto-Novo**...

Neĝustajn esperantigojn oni notas ĉefe kun la sonoj **s** kaj **i**. Sankluiso estu **San-Luizo**, same kiel Luizo; Kasablanko, el franclingva ne hispanlingva Afriko, devas esti **Kazablanko**. Pitsburgo kaj Botsvano ne povas esti prononcataj alimaniere ol **Picburgo** kaj **Bocvano**; kial do mi sesperantigi ilin, simile al la iama »tsetse-muŝo« (ceceo!)? Formoso kutime kaj pli bone estas **Formozo**. Ĉu cetere ĝia ĝisdata nomo ne estas **Tajvano**?

Formoj origine pluralaj ŝajne kondukis la Komisionanojn en eraron: Celebeso Barbadoso, Pampaso kutime estas **Celebo**, **Bardado**, **Pampo**, kiuj konservas la originan akcentitan silabon kaj ne enkondukas parazitajn finaĵojn. Al illi mi volonte aldonus **Gango** (ne Gangeso) por kiu la uzo povas heziti kaj eĉ mi aŭdacus **Honduro**, anstataŭ la tradicia Honduraso, devenanta de plurala formo: cetere **Honduranoj** estas sufiĉe internacia.

La sonoro **i** ankaŭ prezentis malfacilojn: Tahito, Tibesto el franclingvaj regionoj estas eraraj por **Tahitio** **Tibestio**, en kiuj la **i** estas origine akcentita, kaj ĉiuokaze skribita en ĉiuj lingvoj. Brazilio, iama formo de Brazilo, cetere ankoraŭ uzata de iuj en ĝia signifo de lando, estas iom ĝena: kial ne skribi **Braziljo** laŭ la Portugala prononco de tiu urbonomo? Ĉu **Erevano** ne estas multe pli internacia grafike kaj prononce, ankaŭ pli konforma al nia tradicio, ol Jerevan: malgraŭ siaj prononcoj la rusa kaj armena mem skribas ankaŭ Erevan (t.e. sen speciala litero **j**).

Fine Krisĉurĉo ŝokas! Ĉu kun streketo **Krist-ĉurĉo** ne akceptindus?

Kompense oni notas bonajn esperantigojn: **Bonaero**, ekzemple; aŭ ankaŭ **Koreo**, **Vjetnamo**, **Laoso**, **Kamboĝo**, **Nepalo**, **Tibeto**, kiuj tranĉas pasintajn diskutojn favore al internacieco kaj etimologio kontraŭ malprave ekstrapolita Zamenhofa principo; ekz-e, Vjetnamo signifas Fora

Sudo kaj fari el tiu radikulo popolnomon ne povas esti nomata alimaniere ol eraro: ke similan eraron oni jam faris por nun tradiciaj formoj kiel Ĉino kaj Japano (popoloj, ne landoj) ne povas esti ekskuzo. La jam proponita formo **Groenlando** feliĉe solvas la dilemon — inter Gronlando ekzistanta en neniuj lingvoj kaj Grenlando ĝena kaj paradoksa en nia lingvo — favore al la plej internacia ortografio (kaj sufiĉe internacia prononco). Meksiko kaj Meksik-urbo (mi proponus sufiĉe internacia prononco). **Meksiko** kaj **Meksik-urbo** (mi proponus minuskulan **u** post streketo) nete pli taŭgas ol la pura esperantismo Meksikio kaj Meksiko; oni scias, ke México estas la nomo ne nur de la ĉefurbo, sed ankaŭ de distrikto, de ŝtato kaj de la Meksikaj Unigitaj Ŝtatoj: oni distingas ilin per la koncernaj precizigoj, se necesa. Ni devas same agi kaj ne rajtas mem rebapti: sekve, preferinda estus eĉ **Meksiko-urbo**. Kontraŭe Luksemburgurbo estas tute ne akceptebla: eĉ en Esperanto burgo signifas ian fortikigitan urbon! Do oni rezignacie uzu esperantismen, la vaste uzatan **Luksemburgio**; aŭ ankaŭ diru **Luksemburgo-ŝtato**, aŭ tute korekte **Luksemburga Grandduklando**. Sed esperantismen vere ne necesis inventi por la regiono Dekanio, al kiu oni lasu la internacian kaj originan formon **Dekkano**, aŭ **Dekhano** (Waringhien) aŭ eĉ simple Dekano; kiu do konfuzos kun la universitata dekanano?

Fine ni atentigu, ke Gvajano ĝuas nur treege limigitan internaciecon, dum la formo **Gviano** estas almenaŭ angla, itala, rusa, bulgara kaj ankaŭ pli respondas al la franca.

La Komisiono ne plej unue ĉerpis el la fakta uzado kaj el vortaroj por posta modifo en necesaj okazoj; almenaŭ impresas kvazaŭ ĝi sekvis inversan proceduron: unue krei (el la opinioj de la Komisionanoj kaj el voĉdonadoj) kaj nur duavice konsideri la uzadon. Ekzemple ĝi, erare laŭ mi, preferis Atlanta Oceano kaj Paca Oceano, anstataŭ la vaste uzataj **Atlantiko** kaj **Pacifiko**.

* * *

La tria klopodo de la Komisiono estis »ke por ĉiu objekto estu nur unu nomo, sen alternativoj«. Laŭdinda klopodo per si mem kaj tute prava. Sed ĝia plena atento devigis la Komisionon fari sian elekton ekzemple ankaŭ en la alternativo ujo/io; ĉu ĝi esperas esti sekvata de ĉiuj ankaŭ en tiu punkto, por kiu ĝi eĉ ne povas esti kompetenta? Ekde kiam sufiksoj (io/ujo kaj ano) estas uzataj, temas pri la ĝenerala vortaro. Cetere ni estu justaj: en la Komisiono sidis homoj kun tute kontraŭaj opinioj; por antaŭeniri necesis do akcepti kompromison

kaj do ambaŭ sufiksoj aperas, sed en malsamaj landonomoj. Kaj finfine ni agnosku, ke por tiu limigita demando fakte necesos verki elĉerpan sciencan studon, kiu serene eksponos la demandon kaj la diversajn opiniojn kaj proponos prudentajn elementojn de solvo dank'al kiuj ni povos akiri definitivajn kaj unuecan terminaron. La subskribinto esperas post kelkaj monatoj prezenti la rezulton de siaj reserĉoj. Provizore ni estu dankemaj al la Komisiono, ke preter tiu dorna demando, ĝi sukcesis senveprigi la ĝeneralan problemon.

Aliparte en la malfacila grupo Induso, Hindujo, Indonezio, Indociĉina, Duon-insulo (al kiu oni aldonu lingvistikajn terminojn: indo-eŭropa ktp...) la Komisiono ne aŭdacis »klopodi« al nur unu nomo. Malfacilas; sed ofte, reiro al la fonto »pagas«: verŝajne la malplej malbona solvo estus **Indo** por nomi la riveron; de ĝi ni eltirus por la lando la vastege internacian **Ind-io** (de tiu formo disiĝas eble nur la franca **Inde**; sed tiun saman perdon de finaĵo i la franca prezentas ankaŭ en France, Grèce, ktp...), **Ind-o-nez-io** (t.e. la India insul-lando: laŭ la principo de sufiĉo la landsufikso estas esprimita nur unu fojon, same, kiel en la eksa **Aŭstro-Hungario**), ktp... Ke historie la kunuloj de Kristoforo Kolumbo konfuzis la »ruĝhaŭtulojn«, iafoje nomatajn »amerindianoj«, kun la Indi-anoj, pri tio ni ne kulpas.

*
* * *

La kvara klopodo teorie estas same laŭdinda, nome »ke du objektoj ne havu la saman nomon«. Sed praktike? Eĉ en tia reduktita terminaro, tio ne estis atingebla; ekzistas almenaŭ du **Rio-Negroj** sur la mapo: la Brazila, la Argentina. Kio okazos, kiam laŭ sia intenco la Komisiono ellaboros detalajn mapojn por ĉiu regiono?

Aliparte tio kondukas al kreo de dube necesaj esperantismoj, al kreo de »Meropoj«. Ekz-e, nur la **Angla Gviano** konservas sian nomon; la nederlanda feliĉe jam internacie transnomiĝis al **Surinamo**, sed la **Franca Gviano** pro decido Komisiona rebaptiĝas Kajeno, kio envere estas nur la nomo de la ĉefurbo: tiu kontentiĝu per Kajenurbo!! Kial ne transbapti kontraŭe la Anglan Gvianon: eble por eviti la pleonasmon »Ĝorĝtaŭnurbo«! Kaj kio fariĝos en detalaj mapoj el la Brazila kaj Venezuelaj Gvianoj?

Envere, ne! Mi energie protestas kontraŭ tiaj artefaritaĵoj! Bedaŭrinde tio ne estas izola ekzemplo: la **Brita Honduro** same rebaptiĝas (nur en Esperanto!) al Belico, laŭ la nomo de la ĉefurbo! Simile la ĝisnuna **Nigerio** (ĉefurbo: Lagoso) modifiĝas al **Niĝerio**, kio estus akceptebla; sed ĝia nomo konfuzige kaj ne akcepteble transdoniĝas al la **Nigera** (aŭ **Niĝera**) **Respubliko** (ĉefurbo Niamejo), kiun Waringhien Nigerlando.

Oni simple nomu la lastan Nigera Respubliko, kiel ĝi nomas sin nem, kaj la landanoj estu **Nigeranoj** (aŭ Niĝeranoj, se oni akceptas Niĝero anstataŭ la ĝisnuna Nigero por la rivero).

Geografiaj nomoj finfine estas propraj nomoj: oni respektu ilin kiel tiajn. Ni ne rajtas transbapti. Necesas serĉi la plej internaciajn formojn. Kaj se internacie ekzistas duobla signifo, nu pri tio ni ne kulpas. Ial certe la geografoj aŭ la ŝtatoj internacie decidis: ni sekvos.

*
* * *

La kvina klopodo »ke nomo ne estu konfuzebla kun alia vorto« ŝajnas al mi la plej negrava. Ĉu eblos iam konfuzi la landon **Butano** (37) kun la gaso butano? la urbojn **Maleo** (48) **Kolombo** (38) **Apio** (33) kun la ilo malleo, la birdo kolombo (kiu loĝas en Kolombio, kiel foje diris iu ŝerculo!), kaj la planto apio?

Tio povas esti nur argumento por elekti inter du egale bonaj formoj. Tamen ni agnosku, ke Esperanto ĝenerale ne ŝatas tiajn konfuzeblojn. La iamaj popolnomoj Lapo, Esto (apud planto lapo kaj esto) cedis antaŭ **Lapono**, **Estono**; sed ankaŭ internacieco pli granda ludis sian rolon: Leto cedis antaŭ **Letono**; ĉiuj estis iam formitaj per malnova latina sufikso retrovebla ankaŭ en **Teŭtono**, **Bretono** **Gaskono**,... Ni tamen ankoraŭ konservis Sakso malpli bona ol **Saksono**, ĉar konfuzebla kun la germana lando **Sakso**, kaj ĉefe la tradician Polo, malpli bona ol **Polono**, pro kiu oni opiniis sin devigata elekti la vorton poluso, siavice malpli bona ol polo (interpoli, ekstrapoli...). Ni citu ankaŭ la popolnomon Friso (malgraŭ friso) kiu pro loka uzado estas provizore venkanta la pli internacian **Frizono**. Sed per tio ni larĝe preterpasis la terminaron de la mondmapo!

*
* * *

Kaj nun, se ni volus kritiki la principojn, kiujn klopodis sekvis la Komisiono, ni limigus nin al du riproĉoj. La unua estas ke ĝi ne provis doni difinon de la geografiaj nomoj; laŭ mi ili estas antaŭ ĉio propraj nomoj, kiujn oni ne rajtas modifi. Propraj nomoj internaciaj, kies internacieco estas determinebla per la komparado de diversajnaciaj formoj. Necesis voĉdonigi la faktojn, t.e. la internaciecon, kiam okazis hezito: voĉdonigi manplenon da homoj ne sufiĉas, krom eble en lasta vico en okazo de nesolvebla dubo; kaj eĉ! Tio kondukas nin al la dua riproĉo.

La Komisiono ne sufiĉe atentis la faktan uzadon en Esperanto mem. La Aŭstria Esperanto-Instituto, cetere konata kiel konservativa, post esploro de la longa uzado de »Aŭstrio«, prave agnoskis la paron **Aŭstrio / Aŭstriano**, plene konforma cetere al la internacieco; la Komisiono kotnraŭe preferis, kaj Dio scias kial, du purajn esperantismojn: Aŭstrujo / Aŭstro. Alian fojon ĝi senintence trafas la relative pli grandan internaciecon per **Etiopio / Etiopiano**, malgraŭ tio, ke ili ne estas plej uzataj. Sed ial la tre uzata kaj ankaŭ treege internacia **Finnlando** estas eliminata profite al Finnujo. Stranga decido, kiun feliĉe neniu obeos. Ĉu temas pri fobio al duobla konsonanto? Se jes, sufiĉis elekti **Fino** kaj **Finlando!**

Kaj jen, por fini, divenaĵo: kiuj estas la tri partoj de Ĉeĥoslovakio? La radikoj estas Bohem-, Morav-, Slovak-; vi rajtas aldoni unu **-io**, kaj du **-ujo**; mi helpu vin dirante, ke antaŭ la unua Mondmilito kaj tuj poste oni multe uzis la vorton Bohemujo. Respondon trovu ĉe numero 125, dorse de la Mondmapo! Same en Ĉinujo: ni tie trovas Manĉunio kaj Sud-Mongolujo!...

Vere, voĉdonado ne povas anstataŭi sciencan esploradon.

*
* *
*

Restas tamen, ke temas pri monumenta laboro kaj tre utila. Ni severe kritikis, ĉar la verko kaj la temo tion meritis. Aliparte ĉiam eblos kontesti niajn kritikojn: sed finfine mi citis malpli ol 50 nomojn el listo de 850. Tio ne estas tiel multe, se ni konsideras, ke temas pri unua eldono kaj ke la aŭtoroj alvokis al kritikoj por plibonigo post 3—4 jaroj: nur sur laboro de antaŭuloj eblas konstrui ion pli bonan.

Ili meritas helpon: abunde aĉetu la mondmapon. Bela kaj ĝisdata, vi ornamu per ĝi vian bibliotekon aŭ hejmon; dank'al ĝi vi observu la mondajn eventojn esperante!

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)

613.62:611.78 + 612.79

NOVA UNGOMALSANO KAŪZITA DE VIBROJ (Aleksandro Kulcsár, Pécs, Hungarujo)*

La patogena rolo de la serie ripetigantaj mikrotraŭmoj estas ĝenerale konata. Ili povas estigi ankaŭ okupiĝan damaĝon, unuavice vibran en plimultaj okupiĝoj. La malsanoj kaŭzitaj de vibra damaĝo estas unuavice degenerativaj procezoj, en kiuj la patogena faktoro estas iu angioneŭroza perturbo kaŭzita de tiuj konstantaj vibroj.

Nature, vibra malsano ne estiĝas sammaniere ĉe ĉiuj laboristoj. Tio ĉi aludas al tiu fakto, ke krom la kaŭzanta faktoro, la vibro, aliaj (ĉefe internaj) faktoroj ludas tie ankaŭ rolon. Ĉi tiu interna faktoro estas antaŭ ĉio la kongenita displaza strukturo de la arteriosistemo, la tiel nomata angioneŭroza konstitucio.

En kazo de konvena, interna, individuala dispozicio la difektiĝoj estas komence funkciaj, en la kapilaroj aperas komence spasma, poste la longdaŭra spasma kaj konsekva iskemio formigas ankaŭ organajn difektiĝojn. Klinike tiuj organaj difektiĝoj estas karakterizataj per degenerativaj difektiĝoj, kiuj devenas el atrofika perturbo.

El vidpunkto de vibra damaĝo estas tre signifa la laboro de, per pneŭmatika martelo laborantaj, ministoj. Inter la ministoj la vibra damaĝo montriĝas kiel artikaj difektiĝoj, pli guste patogena faktoro estas la vibra damaĝo en artikaj malsanoj de ministoj.

Nun en tiu laboro ni ŝatus konatigi difektiĝon kaŭzitan de vibroj kiu aperis unuavice sur ungoj, klinike en formo de tre karakteriza sindromo.

*) D-ro A Kulcsár, Komitata Prizorga Instituto, PECS, Hungarujo.